# Kolombiaj organiza?oj denuncas preparon de milita invado kontra? Venezuelo.




Bogoto, 20 feb (RHK) Fronte al la stre?i?o travivata en la kolombia-venezuela landlimo, analizistoj kaj politikaj gvidantoj en tiu ?i urbo avertas pri la preparo de milita invado kontra? Venezuelo maskita kiel humanitara helpo.

La? la ?enerala sekretario de la komunista partio kolombia, Jaime Caycedo, Usono celas invadi Venezuelon kaj volas tiom fari ekde Kolombio.

Tio kion oni nomas humanitara helpo envero eliras el la militbazoj usonaj en Karibio kaj estas pravigo por milita interveno, atentigis Caycedo per sia Twitter-konto.

Tiurilate, la kolombia analizisto Oscar Hernando, deklaris al la informagentejo Prensa Latina ke en la landlimo inter tiuj du landoj oni celas krei incidenton por pravigi la frato-murdan militon.

Pri la anoncia koncerto "humanitara" programita por vendredo en la landlima urbo de Cúcuta, Hernando precizigis ke "oni organizas ?in por kolekti 100 milionojn da dolaroj, dum la usona registaro forrabas al Venezuelo pli ol 23 mil milionoj da dolaroj".

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/183942-kolombiaj-organizajoj-denuncas-preparon-de-milita-invado-kontrau-venezuelo

**Radio Habana Cuba**